

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA FRATECO

DIREKTORO: NELSON PEREIRA DE SOUZA

ĈEFREDAKTOR: LÁSZLO ZINNER

JARABONO	RIO DE JANEIRO, OKTOBRO, 1947	Redakcio kaj Administrejo
BRAZILIO — Cr\$ 15,00		R. das Marrecas, 19, 2.º and
Eksterlande — Cr\$ 30,00		Tel.: 22-5300 — C. P. 3677
Aŭ 25 Respondokuponoj	JARO I Monata eldono N° 7	Ekzemplero — Kr\$ 1 00

KLARIGO

Multe malfruigis la okto-bra numero de RIO ESPE-RANTISTA kaj tial ĝiaj abonantoj jam eble timas pri ĝia reguleco; tamen ni devas klarigi al ĉiuj, ke tio okazis tute kontraŭ nia volo, ĉar feliĉe jam ne plu estas mal-sekura ĝia aperado.

La kulpo estas nur de la kompostejo, kie okazis granda konflikto, rezultanta la perdon de la tuta materialo por tiu ĉi numero, ĝuste kiam estis jam finpreparita la tuta paĝumado. Tial ni devas denove kompostigi la originalojn, denove paĝumi kaj presi la gazeton.

Feliĉe ni jam sukcesis pri alia kompostejo kaj presejo: tre baldaŭ aperos la novembra numero, kaj ni intencas aperigi pligrandigita la decembran numeron.

Dank'al multaj novaj abonoj el la tuta lando, enskribiĝoj en la listo de subtenantoj, kaj komercaj anoncoj, jen nia financa situacio pliboniĝis; tamen estas sendube necese, ke la samideanaro daŭre helpadu nin. Sed, ne nur finance oni povas helpi iun gazeton, ankaŭ estas bezonata la konstanta sendado de bonaj verkoj kaj tradukoj, poeziaĵoj kaj prozaĵoj, artikoloj, noticoj kaj humoraĵoj.

Ja certaj ni estas pri tio, ke la brazilaj kaj alilandaj samideanoj ĉiel kunlaborados kun ni por la senhalta kvalita plibonigo kaj kvanta pligrandigo de RIO ESPE-RANTISTA. Niaflanke ni asertas, ke tiucele ni estas deciditaj ĉion fari, laŭ nia ebleco.

KION VI NEPRE DEVAS SCII


Lasttempe okazis, ke kelkaj samideanoj proponis starigi diversajn fakojn en RIO ESPE-RANTISTA. Certe la tendenco neŭtrala de nia gazeto jam permesas la sufiĉon al niaj kunlaborantoj; ili verkas, ili subskribas ili do respondecas pri sia verko aŭ artikolo. Tamen ni ne povas akcepti la proponojn de tiuj samideanoj, ĉar ili ne estas konformaj al la regularo, kiuj orientas nian laboron.

Jen kelkaj eltiraĵoj de la Statuto de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro, kies oficiala organo estas RIO ESPE-RANTISTA:

Ĉapitro 1^a, Artikolo 1^a. A) "Propagandi, instrui senpage, kaj enkonduki la instruadon de la internacia neŭtrala helplingvo Esperanto". Tio signifas, ke precepte ni devas publikigi ĉu portugale, ĉu Esperante, poresperantajn artikolojn, novaĵojn pri Esperanto, kaj ĉion, kio povas instigi la esperantistaron, helpi la instruadon kaj la enkondukon de Esperanto. C) "Stimuli la kulturen interŝanĝon inter la popoloj, speciale inter la Amerikaj landoj". Tio montras al ni, ke devas aperi en nia gazeto interesaj artikoloj, el aliaj mondpartoj por Brazilo, kaj el Brazilo por la tuta mondo. D) "Intensigi la propagandon de Brazilo, eksterlanden, speciale de ĝia literaturo, pere de Esperanto". Kompreneble, tion ni ne devas klarigi, ĉar ĝi estas jam sufiĉe klara. F) "Dissemi la moralan kaj intelektan kulturon inter la membroj". Tio signifas por nia gazeto, ke ni devas atenti pri la aperotaĵoj; ni ne rajtas aperigi verkojn ĉu favorajn, ĉu malfavorajn al la ajn politika aŭ religia partio aŭ dogmo, ĉar tio kaŭzus skizmon, kaj tiel evidentigus, ke ĉe ni la neŭtraleco ne havas ekzistrajton. Tiuj, kiuj deziras propagandi Esperantisman specialan politikan aŭ religian idealon, faru.

Ĉapitro 5^a, Artikolo 18^a: "Ne estas permesata en la ejo de la Asocio ia ajn manifesto religia aŭ politika". Por nia gazeto tio signifas, ke ni ne rajtas manifesti niajn apartajn konvinkojn religiajn aŭ politikajn...

Ni do ĉiam klopodos teni la enhavon de nia gazeto laŭ la supre citita regularo de la Statuto. Tamen povas okazi, ke ni eraros aŭ eraretos; sed oni komprenu, ke tio okazos nevolonte. Ni ĉiuj estas okupataj homoj, niaj vivzorgoj ne permesas al ni nin dediĉi ekskluzive al la redaktado de la gazeto. Ĉiaokaze ni faras nian eblon, laborante, elspezante monon, ofte forlasante nian apartan laboron, por ke vi havu regule, unu fojon ĉiumonate, nian RIO ESPE-RANTIS-TA — n.



LONGE DAŬROS ANKORAŬ MALLUMA NOKTO
SUR LA TERO, SED NE ETERNE ĜI DAŬROS.

ZAMENHOF.

32^a UNIVERSALA KONGRESO

Jam forpasis kelkaj monatoj post la okazigo de la 32^a; tamen nur nun, ni, malproksime de Eŭropo, povas informi niajn legantojn pri ĝi, ĉar neniu brazila esperantisto partoprenis ĝin.

Ni ne prezentas detalojn, ĉar la interesatoj ilin trovas sur la oficialaj kaj pli gravaj gazetoj de nia tutmonda movado.

Vendrede, alvenis la unuaj esperantistoj al Bern, kaj la urba stadiono pleniĝis de "verdsteluloj", kaj nian karan lingvon oni aŭdis ofte tra la stratoj.

La malfermo okazis dimanĉe, la 27^a de Julio, je la deka horo, prezidata de Generalo Bastien. Poste, li transdonis la parolon al S-ro Ed. von Steiger, konfederacia registarano. Franclingve, li parolis nome de la svisa registaro, kaj s-ro Walder legis la esperantan tradukon. La festparoladon faris Generalo Bastien, prezidanto de IEL-UEA, vikle kaj entuziasme, citante la kunfandiĝon de I.E.L. kun U.E.A., kiel finon de la konflikto. Finante, li citas de Zamenhof, dum la Krakova kongreso, la jenon: "Laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: *Kiu plej laŭte krias, tiu estas prava*. Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigos nian aferon pli rapide ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj bezonoj, sed ke ĝi estas grava socia problemo, ke por atingi nian celon, ni devas konstante propagandi nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu estimon kaj konfidon por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komuna interkonsentita decido. Sed ni neniam semu en nia tendaro reciproke malamam kaj malpaco."

Sekvis la elekto de la kongresa direktoraro. Prezidanto: — S-ro Buchli; Vicprezidantoj: Hans Kursteiner kaj Liechti; Sekretarioj: Goldsmith kaj Nicolaisen. S-ro H. Buchli, ekokupante la prezidantan seĝon, salutas la ge esperantistojn, kiuj respondis la alvokon al Berno. Parolante pri la pasintaj jaroj de 1939 ĝis 1947, li memorigas la terurajn okazaĵojn pro "la nacia egoismo, la megalomanio de iuj gvidantoj kun erarigitaj popoloj". Sekvis la salutparoladoj de la reprezentantoj de la registaroj: Aŭstra, Ĉeĥoslovaka, Nederlanda, Norvega kaj Sveda. Poste, venis la dumminutaj salutoj al la Kongreso. Unue parolis S-ino Wanda Zamenhof, edzino de D-ro Adam Zamenhof, filo de nia Majstro. Ŝi estas unu el la membroj de la

Zamenhof familio, kiu sin savis el la ungegoj de nazismo. Parolis la delegitoj de landaj asocioj el: Argentino, Aŭstrio, Belgio, Britujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakio, Danujo, Francujo, Grekujo, Hungarlando, Irlando, Islando, Italujo, Jugoslavio, Maroko, Nederlando, Norvegujo, Nov-Zelando, Palestino, Polujo, Svedujo, Svislando, Usono. Sendis telegramojn al la kongreso, krom privataj esperantistoj, landaj asocioj el: Egipto, Slovenio, Slovakio, Aŭstralio, kaj Palestino.

NOVA ESTRARO

La unua laborkunsido fariĝis signifoplena en la historio de nia movado. Malfermita de S-ro Buchli, tuj parolis generalo Bastien, Prezidanto de nova U.E.A. Informis li pri sia firma decido ekzigi, jam akceptita de UEA-Komitato. "Pli junaj fortoj nun gvidu la ŝipon de U.E.A.". La Komitato estis elektita kiel prezidanton S-ron *Ernfrid Malmgren*. Sinjoroj Bastien kaj Kursteiner estis elektitaj de la Komitato honoraj prezidantoj de U.E.A. pro la gravaj servoj de ili.

La nova estraro de U.E.A., elektita de la Komitato, estas: Prezidanto: Ernfrid Malmgren; Vicprezidanto: D-ro Paul Kempeneers; H. Jakob, I. Lapenna, A. C. Oliver, D. Kennedy kaj P. Petit. La nova Komitato, kategorio A — Anoj elektitaj de la landaj asocioj — estas:

Argentino: Tibor Sekelj;
Aŭstralio: L. E. Pfahl;
Belgujo: P. Kempeneers;
Brazilo: Carlos Domingues;
Britujo: D. Kennedy, B. E. Long, kaj A. C. Oliver;
Bulgarujo: St. Ĝuĝev, kaj A. Grigorov;
Ĉeĥoslovakio: J. Vondroušek;
Dajujo: St. Pink-Jensen, kaj O. Lange;
Francujo: J. Guillaume, R. Levin, kaj P. Petit;
Italujo: G. Canuto;
Jugoslavujo: I. Lapenna, kaj J. Kozlevčar;
Nederlando: P. W. Baas, F. Weeke;
Norvegujo: Kap. R. Bugge-Paulsen;
Svedujo: E. Malmgren, kaj J. Stenström;
Svislando: F. Liechti;
Usono: G. A. Connor.

Kategorio B — anoj elektitaj per voĉdono de la Delegitoj: E. Adamson, D. Chagnoux, H. Jakob, V. Setälä, kaj P. J. Soeters.

Kategorio C — alelektitaj: E. Dahl, J. Saldanha Carreira, D-ro E. Privat, J. D. Sayers, kaj J. Baghy.

PROPAGANDO

Malfermita estis la dua laborkunsido, de Prezidanto Malmgren, kaj la nura afero de la tagordo estis: Propagando. S-ro Székely, el Budapeŝto, legis ampleksan tezon pri metodoj de moderna propagando de Esperanto, kiu tuŝas ĉiujn. La Ĝenerala Sekretario de U.E.A. parolis pri la petskribo al U.N.O. Preskaŭ 300.000 estis kolektitaj, kaj la laboro daŭras. S-ro E. Dahl insistis, ke oni varbu junulojn, ĉar la plenkreskuloj estas malfacile varbeblaj. Opinions Olafur S. Magnusson, ke nia propagando estas blinda, kaj proponas la starigon de ĝenerala propaganda komitato. D-ro Basel parolis pri la libreto eldonita de li: "Pensoj de Zamenhof", kiel taŭga propagandilo. "Estu pretaj elspezi tempon kaj monon", diris interalie S-ro Vilĉjo Verda. S-ro Blazek, el Ĉeĥoslovakio, opinias ke oni devas persisti ĉe la gazetaro, tiel, ke ĝi fine akulturo niajn diojn. S-ro Ohana, el Maroko, diras ke oni devas komenci la varbadon por nia afero en la propra familio. Kaj multaj aliaj parolis ankaŭ pri la ĉefa temo de nia movado.

TRIA LABORKUNSIDO

Ĝi pristudis diversajn aferojn. Oni decidis sendi telegramon al Kongreso de S.A.T., en Aarhus. Estis pristudita rezolucio subskribita de naŭ landaj asocioj. S-ro Vokal, el Aŭstrio, proponis, ke oni kreu en ĉiu lando Societon de Amikoj de Esperanto, por akiri monon por la elspezo de organizitaj asocioj.

DISTRIGAJ KUNVENOJ

Multaj okazis dum la 32^a; je la 28^a de Julio efektiviĝis prelegvespero de Esperanto-verkistoj, kie brilis Kaloesay kaj Baghy. Partoprenis la koncerton la violonisto J. Geyk, el Ĉeĥoslovakio; la soprano S-ino Marguerite Sautreuil, el Parizo, kaj la pianisto F. Merrick, el Anglujo. Okazis ankaŭ Varieteta Vespero, kiu tre plaĉis al la kongresanoj. Meritas specialan citon la internacia balo. La urba loĝantaro mirego vidis amike interparolantaj, homojn el ĉiuj mondpartoj, kun siaj regionaj kostumoj.

Nepre oni devas paroli pri la ekskursoj, sendube multaj, diversaj kaj belegaj.

Ĉiutage okazis rondveturoj tra la kongresurbo, kaj pli ol 15 grandaj ekskursoj. Pro la belegaj somera vetero dum la tuta semajno, ĉiuj tre plaĉis al la partoprenantoj.

Multaj fakaj kunsidoj kaj filmoprezentoj ankaŭ okazis dum tiu belega kongreso, en kiu par-

"SUDA STELO"

Uma nova estrêla surge no movimento esperantista brasileiro: "Suda Stelo", jornal mensal, neutro e independente, órgão oficial de Esperantista Societo de Pôrto Alegre.

Sempre que surge um novo órgão de imprensa em esperanto, é motivo de júbilo para os esperantistas, porque esses órgãos constituem importante fator de aproximação entre os samideanos entre si e entre eles e a sua "societo". Sabemos nós, por experiência própria, quais as dificuldades que devem ser vencidas pelos editores de um jornal esperantista, mesmo mimeografado, como é o novo órgão, e como foi por algum tempo o nosso "Informilo"; por isto, dirigimos os nossos louvores à Esperantista Societo de Pôrto Alegre e aos dirigentes do "Suda Stelo": F-ino Clecy Zamora, diretora, e Boris Eston, redator responsável. Os samideanos realmente merecem palavras de incentivo e o apoio de todos os esperantistas, a fim de continuarem a sua obra.

Desejamos ao nosso confrade uma vida longa e repleta de vitórias.

toprenis pli ol 1.200 personoj, de Nov-Zelando ĝis Usono.

FERMA KUNSIDO

Fine, post semajno plenplena de mirindaĵoj, alvenis la lasta tago. La milo da gekongresanoj kunvenis en la Kazino, ornamita per la flagoj de ĉiuj partoprenantaj landoj kaj per la Esperanta flago meze de ili. La Prezidanto, post la malfermo de la kunsido, resumas la okazintaĵojn dum la kongreso. Malgraŭ multaj malfacilaĵoj, ĉio estis venkita, kaj la kongreso fariĝis gravega en nia movado pro la elekto de nova, pli hela kaj pli larĝa vojo; denove nur unu tutmonda organizaĵo ekzistas, sub la tradicia nomo de Universala Esperanto-Asocio. D-ro Kempeneers raportis pri la laboroj de la Komitato, kiu decidis pri la nova statuto, petskribo, kunfandiĝo, financoj, ka. Sekvis la raportoj de apartaj kunsidoj. S-ro Ströme konigas la inviton por Malmö, Svedujo, kiel ejo por la 33^a Kongreso, kiu ricevis grandan aplaudon.

Tra la tuta salono oni ekaŭdas muzikon. Ĉiuj starigas kaj kantas "La Espero"-n, la himno de la verdstelaj pacbatalantoj. Malrapide oni malsuprenigas la Esperantan verdan flagon; du svissaj esperantistinoj, en siaj kostumoj, prenas la flagon, kaj ĝin transdonas al svedaj samideanoj, kiuj alportos ĝin al la 33^a. Granda emocio, kaj oni aŭdas la lastajn muziknotojn.

Kaj tiel finiĝis nia 32^a Kongreso... Adiaŭ...

KONKURSO

Respondu la ĉi-subajn demandojn kaj klopodu gajni unu el la tri libro-premioj: 1^a) Jarmiloj Pasas, 2^a) Riĉa kaj sen Mono, 3^a) Kulio.

- 1 — En kiu urbo kaj lando naskiĝis D-ro Zamenhof?
- 2 — Kiel aperis la nomo "Esperanto"?
- 3 — Kiam aperis la unua Esperanta libro?
- 4 — Kiel nomiĝis la unua Esperanta gazeto?
- 5 — Kiam kaj kie okazis la unua Universala Esperanto-Kongreso?

Respondojn ni akceptas, el la tuta Brazilo kaj mondo, ĝis la 31^a de januaro 1948. Adreso: Konkursio RIO ESPERANTISTA, Caixa Postal 3677 — Rio de Janeiro — Brazilo.

LA PRINCO DE L' POETOJ

Wilton Ribeiro

Antaŭ longe mortis Camões, sed lia nomo ankoraŭ batalivitas la jarcentojn. Pro lia memoro, versoj plenaj de beleco kaj profunda konscio de la lingvo portugala, estas presitaj. Ne estas la rakontaĵojn, kiujn li verkis en sia "Luziadoj", nek ĉe lia n-versan esprimmanieron, kiujn mi volas pritrakti, sed nur lian vivon plenan de luktoj, kaj lian morton plenan de malriĉeco. Tio ĉi intime li estis ligata al la patrujo, ke ĝi mortis kun li, kiel li mem diris: "Almenaŭ, mi mortas kun la patrujo".

Luiz Vaz de Camões, poeto-soldato, naskiĝis en Lisbono, en la jaro 1524^a. Je la dekdua aŭ dektria jaro de sia vivo, li eniris en la Koimbran Universitaton, kie, instruata de eminentaj profesoroj, li multe progresis en artoj kaj sciencoj. Finitaj siaj studoj, li revenis al Lisbono, kie li korinkliniĝis al iu sinjorino. Tiu okazaĵo determinis lian ekzilon el la kortego al kiu li apartenis.

En tiuj okazaĵoj oni vidas la temperamenton de Camões, ankoraŭ en la juneco; okazaĵoj san vivon.

Reveninte en Lisbonon, denove li falis en aman komplikon, kaj tio determinis novan ekzilon. Lu verkisto opinias, ke ne okazis la dua ekzilo, sed, ke li mem, ne povante reveni la kortegon, iris al Celta (Maroko), kie li soldatiĝis. Tie, en batalo, li perdis sian dekstran okulon.

Igante vera soldato, Camões iris Hinduĵon, kie, post vivado plena de necerteco, li estis ekzi-

lita en Ĉinuĵon, kie li laboris kiel prizorganto pri la mortintoj kaj neĉeestantoj, en la urbo Macau. Revenante al Hinduĵo, la ŝipo en kiu li vojaĝis, pereis. Transnaĝante, li sukcesis savi sin kaj sian poemon "Luziadoj". En Gôa li estis ricevita de novaj registroj, sed tio ne malebligis, ke li estu arestita pro siaj petolaĵoj. Liberigita, Camões iris al Sofalo, en Afriko, kie li ne restis multe da tempo, revenante al Lisbono, en la jaro 1569^a.

En Lisbono, anstataŭ la rekompenco, kiun li meritis pro siaj "gloraj laciĝoj literaturaj kaj militaj", li trovis nur mizeron kaj malsanon. Lia mizero estis tiom granda, ke lia sklavoj, nomata Jaŭ, dum la nokto petis almozojn por nutri lin.

Tiel li mortis, en la jaro 1579^a, kaj sur lia tombŝtono estis skribitaj la jenaj vortoj: "Ĉi tie kuŝas Luiz de Camões, la princo de l' poetoj de sia epoko. Li vivis malriĉe kaj mizere, kaj tiamaniere li mortis".

Per tiuj resumitaj okazaĵoj de la vivo de l' plej famkonata mortinta poeto portugala, oni povas klare vidi lian militan vivon, kaj, ke lia poemo "Luziadoj" estas la esprimmaniero de lia animo vivanta okazaĵojn plenajn de intensaj luktoj kaj necerteco.

Preskaŭ kvin jarcentoj estas pasintaj, kaj lia grandega verko ankoraŭ estas studata kiel modelo por la lernado de la lingvo portugala. En ĝi oni vidas la manon de vera geniulo sentanta en la koro la harmonion de animo envolvita de poeziemo kaj belega esprimmaniero.

FRAGMENTO

Riĉaĵoj kaj socialaj pozicioj dispulvoriĝas per blovado de la tempo, kiel kasteloj, kiujn infanoj konstruas el blankaj kaj fuĝemaj marbordaj sabloj...

Nur la lumo de l' boneco kaj saĝeco brilegas eterne, dum la turmentega nokto de la jarmiloj.. Buda, Confúcio, Sócrates, Jesus, Miguel Angelo, Mozart, Shakspeare, Guerra Junqueiro, Leonardo, Galileu, Edison, Pasteur, Flamarion, inter multaj aliaj, estas la sanktuloj kaj la geniuloj, kiujn la homaro estas produktinta, steloj de unua grandeco invitantaj nin al pli alta nivelo de perfekteco...

La progreso, precipe morala, marŝadas malrapide, sen saltoj. Ĝi nur grade fariĝas!

La ideo estas disjetita, malfacile ĝermas, sed, malgraŭ la cirkonstancoj ĵu pli malfavoraj, des pli sublimita ĝi montriĝas, ĝi kreskas kaj floras inter la varmeo de malamoj kaj simpatioj...

Finfine, ĝi fruktodonas.

Poste, sub fatala leĝo nomita de ni Evolucio, la ideo eniras en la kategorion de la seninteresaj aferoj, kaj perdiĝas en ia el la kurboj de la estinteco...

La homoj ŝanceliĝas. Ili stimulas la imagon kaj sondas la horizontojn de l'estonteco...

Dun kelka tempo ili sin juĝas malfortaj boatetoj, flosantaj senkompose sur uragana kaj perfida maro...

Sed, subite, la homamaso videtas novan torĉon, montrantan al ĝi la evolucian vojon, la senfinan grimpadon...

Jen, estas nova geniulo, kiu subite ekaperas, alportanta novan, nekonatan kaj pli altan idealon.

Estis, do, obeante tian evolucian ritmon ke, en la tago 15-a de Decembro de 1859 alvenis al tiu ĉi planedo Lazaro Ludoviko Zamenhof.

Signifoplene! Li prezentis al ni internacian idiomon en la momento, kiam la scienca aŭtaŭneno estas detruanta la materian distancon inter la popoloj, kaj la socialismo preparas al ni la epokon, en kiu la forto de la Rajto venkos la nunan rajton de l' Forto.

Esperanto estas unu el la plej grandaj elementaj naskontaj la tutmondan pacon, ĉar ĝi alportos alproksimiĝon inter la popoloj.

En la tago, kiam la homo, per la miraklo de la lingva kompre-

no, ekde la plej simpla ĝis la plej genia, sentos, ke ĉiuj estuloj ploras pro la sama doloro kaj ridas pro la sama ĝojo, tiam malaperos la rasaj malfidoj.

Kaj tiam, ni komprenos la maleksteran egalecon de la homa animo, ĉu ni estu naskiĝintaj sub nebula angla ĉielo, ĉu sub la hela ĉielo signita de la Suda Cruco sin reflektanta sur la akvo de l' bela Gvanabaro; en Hinduĵo, dormetanta sur la misteroj de l' antikveco, aŭ en la gaja Francujo; en Usono, ĉiam soifanta materian potencon aŭ en Rusujo, kiu, ĉu bone ĉu malbone, restos en la paĝoj de nia Historio — kune kun la vireca Lenin — kiel pioniro de la Sociala Justeco; en Grekujo, nune senforta, sed ankoraŭ influanta la mondon per la forto de l' geniaj pensoj de siaj antikvaj filozofoj, aŭ en la fierega Germanujo, kiu, dum tagoj plenaj je frenezo, revis submeti la mondon al siaj sovaĝaj kapricoj; en Portugalujo kaj Hispanujo, ĉiam katenitaj de severaj religiaj dogmoj, senflugiloj por transflugi la senliman vastecon de la idealo aŭ en Egiptujo perfortanta la pordojn de la Saĝeco-Templo, avidante sensoiĝi en la klarega fonto de la Supera Iniciato; en Ĉinuĵo, renversita en adorado al Konfucio, aŭ en maldankema Palestino, forlasinta sian plej grandan filozofon: la Milda Rabeno de Galileo.

En tiu tago, glora por Esperanto, ni ridos ĉe la rememoro pri la nunaj tagoj, en kiuj la politikuloj kunsidas por subskribi porpacan traktaton inter la nacioj.

Hipokritaj traktatoj!

Oni pripensas kontrakton por bona najbareco, nur kiam oni vivas en kverelado. Kontraŭe, ĝi estus eĉ primokinda.

Se ili ne sentus, do, baldaŭn militon, aŭdante, en si mem, la raŭkan muĝadon de la malsupera animaleco, preskaŭ eksplodanta, ili forgesus tiajn antaŭgardilojn.

Oni havos pacon kaj konkordon, fundamentitan sur sociala justeco, nur tiam, kiam la amo kaj la belo regos en ĉiuj koroj.

Ja tiu estonteco de sublimita vivo estos ĵu pli proksima de ni des pli intensa kaj vasta estos nia peno por disvastigo de la Idealo, kiu nun kunvenigas nin, kaj kiu faros, el tiu ĉi mizera mondo, tiun Kanaanon delonge al ni promesita kaj vane de ni esperata: Esperanto kune kun sia Interna Ideo.

Cedilha Neto.

Havigu reklamojn kaj abonantojn por la
plibonigo de via gazeto:
"RIO ESPERANTISTA"

O ESPERANTO E A SOCIEDADE INTERNACIONAL DOS ESTUDANTES

ALBERTO FLORES

P. Alegre

(1.º lugar no concurso de "Juventude Unida")

Tanto esperantistas como sieanos buscam concretizar o grande Ideal de Paz e Fraternidade entre os Homens.

Os esperantistas dispõem de um século maravilhoso para facilitar as intercomunicações, a língua artificial Esperanto, notável pela sua facilidade e compreensibilidade.

Os sieanos usam, como meio de intercomunicação, a carta, o mais simples, mais prático e ao alcance de todos.

O verdadeiro valor da correspondência cultural amigável, como fator de aproximação e entendimento entre os povos, ainda não foi bem percebido pela maioria.

O verdadeiro mérito da língua Esperanto, como linguagem ideal para o entendimento entre os povos, inexplicavelmente ainda não foi compreendido por todos os homens.

Os sieanos usam a conversação escrita, por ser um meio prático de se entenderem à distância.

Os esperantistas têm uma linguagem simples, utilizável com vantagens, tanto na conversa escrita como na falada.

Os ideais de ambos se harmonizam e se casam, perfeitamente se completando. Ideal será, pois, que ambos se unam e trabalhem juntos em prol de sua causa comum.

O Esperanto é algo de utilidade incontestável para facilitar as relações e amizade entre os sieanos de todo mundo. E' de se esperar, portanto, que os membros da S.I.E., sabendo disto, a ele se dediquem, dando mais uma mostra de sua compreensão e idealismo.

A S.I.E. é uma entidade que, associando idealistas de boa vontade, em todas as terras, pode prestar ao movimento esperantista inestimáveis serviços: não só na propaganda e divulgação do Nobre Idioma, como formando os novos "samideanos", interessados e sinceros, capazes de dar um novo vigor e notável impulso ao Esperanto. E' necessário, pois, que os esperantistas apoiem e venham colaborar com a S. I. E., buscando no meio estudantil os futuros continuadores de sua idealística obra.

O caráter de neutralidade dos dois movimentos irmãos permite, numa admirável confraternização, que deles participem todas as gentes. A elevação do seu ideal oferece, aos que nele participam, oportunidade de serem realmente úteis à Pátria e à Humanidade, numa eficiente con-

tribuição para a felicidade e bem estar geral.

O ideal que orienta esperantistas e sieanos não é particularista; não é de nenhum grupo, é de todos os que sentem ser a Fraternidade melhor do que a beligerância e o egoísmo.

A intercooperação de esperantistas e sieanos é, por conseguinte, possível e desejável, pois o Esperanto é útil à S.I.E. e esta não menos útil ao Esperantismo.

Ambos saberão compreender isto, ampliando, cada vez mais, a colaboração que já se nota entre os dois grupos, numa magnífica demonstração do quanto é elevado o espírito de fraternal colaboração, amizade e cordialidade, que anima sincera e desinteressadamente os sieanos e os esperantistas, no desejo de conseguir um Mundo de Fraternidade e de Paz para todos.

ESPERANTICES

Aquí estamos, caro leitor, trabalhando no afã de tornar o Esperanto, idioma internacional-auxiliar-neutro, cada vez mais conhecido. E' um dever que procuramos cumprir, aliás prazeiramente, pois que também já sentimos a grandiosidade da Fraternidade, o ideal de Confraternização, a necessidade de Compreensão, de Entendimento, de Amizade!

Aquí estamos, caro leitor, empenhados na divulgação do ideal de uma só língua para as relações internacionais, para, ela somente, ser usada nas relações escritas e faladas, entre as pessoas de língua diferente.

E toda vez que nos for possível, invocaremos, pediremos com insistência o apoio geral, a ajuda de todos, porque nos tem sido agradável, útil e muito bom o Esperanto, proporcionando-nos o ensejo de conversarmos, por escrito e oralmente, com amigos, de outras pátrias, que não sabem o nosso idioma. Dêles temos recebido cartas, fotografias, vistas de suas principais cidades, informes sobre coisas de nossas profissões e, a nosso turno, lhes enviamos, também, vistas do nosso Brasil, que, assim, se torna cada vez mais conhecido no estrangeiro.

Cooperar, pois, com o Esperantismo, com a genial idéia do sábio polonês — Dr. L. L. Zamenhof, é um dever, é uma honra, caro leitor!

O. S. Lopes

SENFINA ANGORO

EL LA ĈINA POEZIO

Li Tai Po (699ª — 762ª j.)

*De l' vojaĝ' la celon deziregas mi atingi
kaj ardantan la aflikton de l' angor' estingi.
Kiel miaj zorgopensoj, la insektoj zumas
ĉe la fontobordo, kiujn lunrad' orumas.
Sur malvarma mia mato, da glaci' tabulo
maldiketa brilas, kvazaŭ estus ĝi spegulo.
La lanterno sur la mur' malforte trembriletas,
en aflikton mian ĝi pli da malĝojo jetas.
Min por trankviligi, el la ombro mi foriras,
al la Luno mi rigardas, tamen resopiras.
Kvazaŭ floro, inter nuboj paŝas ĝi kviete;
super mi ĉiela blu' etendas sin diskrete,
kaj malsupre tre intense verda la koloro
kaj trankvilas akvoj, kun kaŝita la trezoro.
La ĉiel' senlima estas, granda tre la tero;
pliangoras mia kor' ĉe tu konsidero:
Kiel tra l' pordego pasos mi al la montaro?
Ĉu projekton mian ne detruos iu baro?
Kial tremas mia koro
pro la mens-angoro?!*
(Laŭ la angla traduko de Witter Bynner,
esperantigis Francisco V. Lorenz)

Esperanto Venkas

KVAR KOMERCAJ FIRMOJ, en Brazilo, jam uzas Esperanton, nome: Babel Representações e Comércio Ltda., Dufratasocio, Komerca Bonaferoj-Asocio, kaj Getulio Soares Araujo.

DUM LA XI B. K. E. oni inaŭguris, en urbo São Paulo, straton nomata "Esperanto".

BRAZILA MINISTERIO POR AGRİKULTURO, São Paulo, fako pri Animalaj Produktoj, multobligis kaj disdonis ĉirkuleron pri Esperanto kaj D-ro Zamenhof.

BRAZILA INSTITUTO POR GEOGRAFIO KAJ STATISTIKO presigis esperantan broŝuron pri la urbo São Paulo, okaze de la XI B.K.E.

KONVENCIO EN STATO MINAS GERAIS okazos ankoraŭ ĉi-jare, kaj la tiea registaro donacos al ĝi bonan subvencion.

NIAJ PERANTOJ

- Belo Horizonte — DR. L. DE AZEREDO COUTINHO,
Rua Carijós, 218 - 2.º andar - Sala 26.
Foz do Iguaçu — CARLOS H. DIONISIO.
Salvador — EDGARD DA SILVA ESTRELA,
Rua 3 de Maio, 12.
São Paulo — VICTOR MINIERO, Rua Comandante Salgado, 234.
Pôrto Alegre — ARY ZAMORA, Rua S. Carlos, 1192
Uberlândia — HAROLDO LEITE PINTO, Caixa Postal, 337.

Aliaj gesamideanoj, kiuj deziros reprezenti "RIO ESPERANTISTA"-N en aliaj urboj, bonvole skribu al la redakcio.

PALACE MÓVEIS

Exposição permanente de Móveis de fino gosto

P. M. RAWET & CIA. LTDA.

Pc. das Nações 184 — R. Cardoso de Moraes 506-A

